

Thomas Moore,
La lasta rozo

tradukita de Antoni Grabowski

Jen floras sola, forlasita la lasta rozo de l' somero,
Dum ĝia ĉarma gefrataro, velkinte kuŝas jam sur
tero.

Ne estas ia flor' parenca, nek roz-burĝono en prok-
simo,

Por interŝanĝi la ridetojn aŭ la sopirojn, laŭ kutimo.

Mi vin ne lasos, ho soleca, ĉagrene sur trunketo brili;
Ĉar la karuloj viaj dormas, do iru, dormu vi kun ili!
Foliojn viajn mi afable disĵetas sur bedeto jena:
Vi kuŝu apud senaroma, malviva kunular' ĝardena!

Mi tiel sekvu, kiam pasos de l' amikeco flor' fidela,
Kaj el brilanta amo-ringo elfalos lasta ŝton' juvela.
Ĉar kiam velkis veraĵ koroj, sentemaj flugis for el
rondo,

Ho, kiu volus tiam loĝi solece en malvarma mondo?

*Traduko de la Angla poemo "T is the Last Rose of Summer" de THOMAS MOORE (*1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (*1857-06-11 – †1921-07-04).*

Arg-530-1056 (2010-03-28 19:37:25)

Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, kopiis el la retejo <http://www.netlibrary.net/eBooks/Wordtheque/eo/221211.TXT>.

Thomas Moore,
La lasta rozo de somero

tradukita de N. N. 101

Nun floras de l'somero la sola lasta rozo.
La kunvivantoj ĝiaj velkis en mortripozo:
ne estas flor' parenca, aŭ rozburĝono ia,
Por ĝemojn kaj ruĝiĝojn redoni al alia.

Mi ne vin lasos sole, sur la tronket' plendeti
Ĉar la beluloj dormas, vi devas kundormeti.
En morto, sen parfumo, l'amikoj jam dor-
metas:

Do floron vian teren ĝentile mi disĵetas.

Mi tiel volus sekvi se l'amikec' finiĝus
Aŭ la juveloj brilaj de l'amular' foriĝus:
Ĉar se la koroj veraĵ kaj dolĉaj ne plu estus,
En la dezerta mondo volonte kiu restus?

*Traduko de la Angla poemo "T is the Last Rose of Summer" de THOMAS MOORE (*1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de N. N. 101.*

Arg-530-2211 (2014-11-03 22:41:14)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en <http://www.gutenberg.org/files/38240/38240-h/vol1/e01.htm>.